

Venontaj kunsidoj:

- Sa, la 12an de junio
Ekskurso
- Lu, la 6an de septembro
Gramatikajoj
- Lu, la 4an de oktobro
Karlota prelegos
- Lu, la 1an de novembro
David prelegos

Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe : eventaservo.org/o/LES

Lunde, la 3an de majo 2021 je la 20-a ĉe Knud kaj Marie-Antoinette Sunier en Montreux Cléa Robin malkovrigos al ni « *La Dancon de la Energio* »

Universala Esperanto-Asocio (UEA)

La plej granda esperanta organizo estas la *Universala Esperanto-Asocio* (UEA) kun proksimume 7000 individuaj membroj, al kiuj aldoniĝas la membroj de la landaj Esperanto-Asocioj ligitaj kun UEA. La organiza strukturo estas sufiĉe komplika, kaj kompreneble ĝi estas, kiel

ĉiuj tradiciaj organizoj, piramideca : la decidojn faras la estraro, kiun dum la kongreso elektas ĉiujare komitatoj diversmaniere elektitaj per referendumo inter la individuaj membroj kaj per elektoj ene de la landaj organizoj.

Sed kio esence limigas la agadkapablon de UEA ne estas ĝia piramideco, sed la fakto, ke ĝi estas « neŭtrala » en tiu senco, ke ĝi ne enmiksiĝas en politikajn kaj sociajn diskutojn ekster la lingva demando. Ĝi zorgas precipe

pri la propagando por la lingvo Esperanto kaj pri gravaj servoj por siaj individuaj membroj. Pro tio oni nomas tian organizon « poresperanta », kontraste al tiuj, kiuj laboras ne por, sed pere de Esperanto. Alia trajto, kiu limigas la aliĝon al UEA kiel individua membro, estas la fakto, ke ĝi postulas sufiĉe altan kotizon, kiun ne povas pagi la plej multaj homoj en la evolulandoj.

el *LE MONDE DIPLOMATIQUE*
de Vilhelmo LUTERMANO

Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

Komitato 2020

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto; Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

La komitato informas:

Nia programo aperas en <https://eventaservo.org/o/LES>

Babiladaj Rondoĵoj
ambaŭgrupe je 19h00:

Ve, la 30an de aprilo
ĉe Francisko
Ch. de la Vallombreuse 14
076 411 14 55



Ve, la 21an de majo
ĉe Charlotte Blanc Maillard
Avenue Nestlé 7, Vevey
021 922 34 74
079 393 32 63

Ekskurso 2021

Nia vicprezidanto, Knud, organizas nian jaran « vizittagon » en la *Svisa Orgena Muzeo* en Roche la 12an de junio.



LA FANTOMOJ DE LA LAGO

versio B, parto 1

Trovu indikitajn vortojn en skemo.
Restantaj literoj formas nomon de bildo.

E	O	T	A	T	S	A	R	G	O	N	O
P	O	I	V	E	L	E	D	N	E	M	I
A	R	T	L	N	E	O	N	O	U	O	N
L	R	A	O	E	I	I	B	I	N	F	I
A	O	N	Z	R	K	I	N	E	O	E	M
D	T	O	T	E	O	R	D	D	O	R	U
I	N	I	L	N	O	B	E	L	I	O	L
O	E	O	E	F	I	D	R	B	T	O	A
I	Ĝ	S	I	L	I	C	I	O	E	I	N
L	R	L	O	S	M	I	O	M	M	M	T
A	A	M	A	G	N	E	Z	I	O	O	A
K	L	O	R	O	N	O	D	A	R	R	N
C	E	Z	I	O	B	M	U	L	P	K	O

ALUMINIO
ARGONO
ARSENO
ARGĜENTO
ASTATO
BERKELIO
BORO
BROMO
CEZIO
FERO
INDIO
ITRIO
KALIFORNIUMO
KALIO
KLORO
KROMIO
LANTANO
MAGNEZIO
MENDELEVIO
MOLIBDENO
NEONO
NIKELO
NOBELIO
ORO
OSMIO
PALADIO
PLUMBO
PRAZEODIMO
PROMETIO
RADONO
SILICIO
TITANO



«Iam» - tiel komenciĝas tiu terura rakonto. Amiko mia, kiu loĝas en Kanado, decidas ferii en nia regiono kun sia edzino. Li sendas al mi leteron por informi min pri la datoj de sia vojaĝo. Mi do respondas al li, ke mi ĝojas revidi lin kaj lian edzinon. «*Mi iros en la flughavenon por bonvenigi vin.*» Mi notas lian alventagon kaj horaron en mian agendon: «*Dum miaj libertagoj mi plezure vizitigos vidindaĵojn de nia regiono.*» En la letero li parolas al mi pri restoracio apud la lago sude de mia urbo, kiun li absolute volas koni. Kial "absolute" ... mi ne vere komprenas kial. Ĉu estas specialaĵoj por manĝi tie? Mi decidas atendi renkonti lin kaj esti vidalvide de li por ricevi pli da klarigoj.

Du tagojn poste en dua letero mia amiko diras, ke li plezurigas pri sia vojaĝo sed ankaŭ skribas, ke iu stranga sento invadas lin kaj bizara forto puŝas lin veni svislanden. Mi ne konis mian amikon tiel mistera kaj timemeta.

Mi kalkulas, ke nun horas en Kanado la tria posttagmeze. Mi do tuj decidas telefone alvoki lin por kompreni, kia sento enigas lin. Li respondas al mi kiel kutime per ĝoja voĉo. Mi demandas lin, kiel li fartas kaj klarigas, ke mi ĵus ricevis lian leteron. Li ridas dirante, ke profesie estas momentoj malfacilaj por li, ke li tre lacas kaj bezonas tiujn feriojn en mia lando. Fine de la telefonvoko mi mem sentas min bizara.

Kial? Mi tute ne scias sed nun estas pli bone atendi ilian alvenon. Du semajnojn poste mi estas en la flughaveno por bonvenigi la paron. Mi nur unufoje vidis la edzinon de mia amiko, Julia, kiam mi vojaĝis en Kanado. Kiam mi ekvidas ilin iomete lacaj sed ridetantaj, mia koro vere ĝojas. Ni brakumas nin kaj ridas senĉese. Veturile mi kondukas ilin al mia hejmo, kie ili povas ĝui privatan ĉambron. Mi preparas por ili bonan varman manĝon. Ĉe

tablo ni povas finfine paroli pri la restoracio, kiu multe interesas Maksimon. Li klarigas al mi: «*Antaŭ tri monatoj malaperis en Svislando mia amiko Ernesto. Li dumferie loĝis ĉe amiko. Tiam okazis stranga dramo.*» Li haltas momenton tre emocia.

Postminute li daŭrigas dirante: «*La historio aperis en ĉiuj montrealaj gazetoj, kiuj rakontis la aferon. La nokto alproksimiĝis sur la nigra lago, kie velveturis malgranda barko. Tri personoj ĉeestis enŝipe, Ernesto kun geviroj el liaj kunuloj. Alvenis el Ĝenevo granda tempesto kun tondroj kaj fulmoj. La virino blanke vestita kriis tre laŭte. Oni ankaŭ povis aŭdi la raŭkan voĉon de la alia viro, kiu tre koleris. La tri ŝipanoj certe ne rimarkis la tre malbonan veteron alvenantan. La luno jetis iomete da lumo sur la lago. Luj observis la scenon de la strando. La ondoj pli kaj pli grandiĝis. Post kelkaj minutoj la krioj malaperis en la bruo de la tondroj.*»

Intervjuo de Esther Schneider, fidela membro de LES.

(Fare de Francisko)

- *Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze. Mi naskiĝis en 1964 en Würenlingen (AG), kie mi vivis miajn lernejarojn. Mi metilernadis ŝuvendistinojn ĉe Bailly ankaŭ tie. Ĉiam ĉe la sama firmao mi kelkjare laboris en Locarno kaj finfine en Ĝenevo. Tie mi konatiĝis kun koramiko Sabit, albano, kaj naskis mian filinon, Corinne. Miaj gepatroj rifuzis la edziniĝon; mi do reiris alemanien por labori ĉe Orange. Poste mi senfiline revenis Laŭzanen edziniĝi kun Sabit. Bedaŭrinde li mortis lastjare.*

- *Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

Nun mi laboras ĉe Swisscom. Iam mi aŭdis du kolegojn rakonti, ke ili studas esperanton ĉe Karlota en Vevey.

- *Kiam vi decidis studi esperanton?*

Tuj mi surrete serĉis kursojn en Laŭzano kaj aliĝis ĉe Francisko en julio 2012.

- *Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

Mia gepatra familio ridegas pri mia ideo kaj tiu de mia edzo diras: "Kial vi ne studas la albanan?" Mia filino diras, ke ŝi ne havas tempon por studi esperanton.

- *Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

Mi nur konas amikojn en esperantio.

- *Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

Mi neniam partoprenis Kongreson. Sed mia plej bela sperto pri esperanto estas la filmado de la *Sekreta Vilaĝeto*. Mi multe plezuras ludi rolon. Amuze estas, ke mia patro ŝategas spekti la filmon enrete unufoje semajne; la sceno preferita de li estas kiam la vilaĝestro (David) rakontas sian vivon.

